

AKTUALAJ INFORMOJ DE JURBARKAS‘AJ GEESPERANTISTOJ


# HORIZONTO

Jurbarko esperantininkų informacinis leidinys

NUMERO 4(23) (IV-A KVARONO) 2017

SALUTOJ, BONDEZIROJ

Karaj miaj geamikoj, mi elkore gratulas Vin okaze de Kristnasko kaj Nova 2018 jaro kaj deziras sanon, feliĉon kaj ĉian sukceson




**Prezidanto de Esperanto klubo „Horizonto“**
**Stanislovas Raulynaitis**

Intertempe 09-01-12.31 klubanoj festis naskiĝtagojn: **Estimataj Zofija Babonienė, (10.07), Juozas Minikevičius (10.28)**

**FELIĈAN NASKIĜTAGON!**




Ni gratulas vin kaj deziras al vi sanon, sukceson kaj ĝojon!

**Geklubanoj de Esperanto klubo**

## NI VOJAĜAS
## Ekskurso al Kretinga – Palanga

La 21-an de oktobro niaj klubanoj partoprenis en la busa ekskurso al Kretinga – Palanga. Je la 10-a horo nin en Kretinga akceptis ĉiĉeronino kaj ni perpiede komencis konatiĝan ekskurson vizitante kirkon (kirche) de evangelikoj luteranoj, preĝejon de sankta Mario, sub la gvido de monaĥo ni vizitis monaĥejon de pranciŝkanoj. Ankaŭ ni grimpis al turo, malsupreniĝis al keloj.
Poste ni iris al malnova tombejo, kie troviĝas kapelo de sankta Antano kaj daŭris ekskurson per buso al palaco de grafoj Tiškevičiai. Tie ni vizitis muzeon, rigardis la ekspozicion - rondo de suno, ĝojis ĉe eksponaĵoj en vintra ĝardeno . En la kafejo de vintra ĝardeno ni tagmanĝis.

Posttagmeze ni veturis al Palanga. Tie ekskurson komencis de Ortodoksa eklezio. Poste sekvis

ekskurso al bieno de doktoro J. Šliupas. Vespere antaŭ forveturo hejmen ni vizitis Baltan maron.
Hejmen ni revenis kun bona humoro, kaj atendos ni novajn ekskursojn.



**Preĝejo de sankta Mario**



**En la korto de monaĥejo de Franciŝkanoj**



**Monaĥo rakontas pri la vivo en monaĥejo de Franciŝkanoj**



**En la vintra ĝardeno de dekstre J. Kriščiokaitis kaj**

**S. Raulynaitis**



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



Ortodoksa eklezio en Palanga




Bieno de doktoro J. Šliūpas



En la Ortodoksa eklezio




En bieno de doktoro J. Šliūpas plej maljuna ekskursantino K. Petraitienė kaj plej juna.

Fotoj el ekskurso de S. Raulynaitis

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

## INFORMOJ

La 24-an de novembro okazis vica kunveno de klubanoj de Esperanto klubo „Horizonto“. Partoprenis 6 anoj. Programo de la kunveno estis riĉa.
1. Impresoj el la ekskurso al Kretinga – Palanga. Rakontis partoprenintoj.
2. Informo pri estonta la 53-a kongreso de Litova Esperanto Asocio kaj Zamenhof-Tagoj-2017.
3. Informo pri la abonado de E-revuoj.
4. Informoj pri Esperanto movado. Raportis Stanislovas Raulynaitis
4. Libera tribuno



**Sur la foto de dekstre R. Petraitytė, J. Martišienė, S. Raulynaitis, I. Viliušienė, R. Endriulaitis**

## RENKONTIĜO DEDIĈITA POR LA ADIAŬI LA JARON DE KOKO

La 15-an de decembro vespere ĉiuj klubanoj kunvenis en la kafejo Karšuva. Nin atendis preta la festa tablo. Komence ni per minuto de silento hanorigis Aldona Žižiene, kiu ĉi-jare nin restigis.

Poste ni ludis ludon „Jes –Ne“. Ludon gajnis Arūnas Vaivada. Gastuminte ni rememoris ekskursojn organizitajn de nia klubo. Ni decidis ankaŭ en la nova jaro organizi ekskursojn al Pakruojis kaj Bjalistoko. Min tre ĝojigis sinceraj bondeziroj kaj donaco de la klubanoj.

Ni disiris bondezirante al Esperanto klubo kaj unu al alia en la nova jaro pli viglan agadon...

**Prezidanto de Esperanto klubo „Horizonto“**
**Stanislovas Raulynaitis**



**Dum la festa vespero**

## La 53-a kongreso de Litova Esperanto Asocio kaj Zamenhof-Tagoj 2017.

La 9-10an de decembro en la urbo Kauno okazis la 53a kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj Zamenhof-Tagoj-2017, kiujn partoprenis iom pli ol cent Litoviaj esperantistoj el 11 urboj kaj gastoj el Latvio. Inter partoprenintoj estis 5 jurbarkanoj: Irena Viliušienė, Laimundas Abromas, Rimantas Endriulaitis, Zofija Babonienė kaj mi.



**Sur la foto jurbarkanoj: R. Endriulaitis, Z. Babonienė, L. Abromas kaj S. Raulynaitis**

La 53a kongreso de LEA komenciĝis per raporto de la prezidanto de asocio Povilas Jegorovas pri la agado de LEA dum la pasinta jaro. La jaro estis eventoplena kaj ĝenerale sukcesa. La ĉefa agaddirekto de la asocio ĉi-jare estis ligita al informado pri Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto okaze de la centa mortodatreveno de la kreinto de Esperanto kaj la 130a datreveno de la apero de la Unua Libro de Esperanto. Dum la jaro en gazetaro, novaĵportaloj, novaĵagentejoj, televidoj, radioj kaj aliaj amaskomunikiloj de Litovio aperis pli ol 150 artikoloj, intervjuoj, elsendoj k. s. Estis menciita kaj nia Esperanto klubo pro artikoletoj pri Esperanto en gazetaro kaj eldono de revueto „Horizonto".

La ĉefa publika aranĝo en 2017 sendube estis la ampleksa ekspozicio pri Ludoviko Zamenhof en Vilno kaj en Kaŭno. Ĝi estis efektivigita kunlabore kun la Pola Instituto en Vilno. Tiu ĉi ekspozicio cirkulos tra ĉiuj Litoviaj urboj.

Dum la jaro estis bone flegataj internaciaj ligoj de Litoviaj esperantistoj.


Eldonado: en 2017 aperis la libro *„Zamenhofo en historia Litovio"* de Vytautas Šilas, kaj en Marijampolė ĵus estis eldonita la dulingva libro *Esperanto žingsniai Marijampolėje / Esperanto-paŝoj en Marijampolė* de Danutė Vidrinskienė. LEA kunlaboras kun la Kaliningrada eldonejo *Sezonoj* en preparado de la enciklopedia libro *Nia diligenta kolegaro.* Petras Čeliauskas finkompilis grandan litovan-Esperantan vortaron kun ĉ 45 mil vortoj (pli ol 800 paĝoj). Ĝi aperos en 2018.

Dum la jaro okazis multaj renkontiĝoj kun altranguloj en la Litovia parlamento, en la ministerio pri edukado kaj scienco, en la ministerio de kulturo k. a.

Fine de sia parolado Povilas Jegorovas enmanigis gratulfoliojn al 12 ĉi-jaraj jubileuloj.

Post la agadraporto de Povilas Jegorovas, raportis pri kluba agado prezidanto de la Vilna junulara Esperanto-klubo *Juneco* Marijus Dilba, prezidantino de la Esperanto-klubo en Panevėžys Vida Kulikauskienė, Birute Rozenfelde el Latvio, Palmyra Lukoševičienė el Panevėžys, Vilius Šidlauskas el Panevėžys, Audrys Antanaitis el Vilno.

Dum kongreso oni povis aboni e-revuojn, pagi membrokotizojn. Subskribi al 103-a Universala Esperanto kongreso, kiu okazos en la Lisabono, Portugalio kaj 54aj Baltaj Esperanto Tagoj, kiuj okazos en Estonio



**Prezidanto Jegorovas prezentas la agadraporton por 2017.**

Post la kongreso okazis tradiciaj Tagoj de L. Zamenhof – 2017. Post solena malfermo okazis prelego de Vytautas Šilas laŭ temo „155-jara jubileo de eminenta Kaunano Paŭlo MEDEM: bankisto, esperantisto, meloma-no, akademiano".

Poste ni vizitis la ekspozicion dediĉita al la 100-jara mortodatreveno de Ludoviko ZAMENHOF en Urbodomo de Kaunas ( Rotušės a. 15 ) .

Vespere okazis koncerto de muzika grupo „Rakija Klezmer Orkestar".



Muzika grupo "Rakija Klezmer Orkestar".

Ni revenis hejmen kun bona humoro.

**Prezidanto de Esperanto klubo „Horizonto"**
**Stanislovas Raulynaitis**

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

## Mia konatiĝo kun vintra Vilno.

Antaŭ la Nova jaro mi vizitis Vilnon. Ĝojis mi pri belega Kristnaska abio. Vizitis mi ankaŭ la Katedralon. Feliĉis mi eblecon partopreni en la Sankta meso. Nia ĉefurbo vere plibeliĝas.



**Mi apud Kristnaska arbo.**



**Mi apud la Katedralo.** **S. Raulynaitis**

**Redaktoro: Stanislovas Raulynaitis**
**Korektadon okazigis L.Abromas**
**Kontaktoj: klubas.horizontas@gmail.com**
**Tel. Nr. 8-620 21024**

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj